Estis pro tiu emotsiidžo de la popolo, raportita de la elsenditoj, kaj pro tiu rimarko de Nikodem, ke la Farisajoj ektimis fortan *oprogreson de la popularetso de Jesuo kaj organizis la unuan kunvenon de la Sanhedrino ... senbrue kaj private. Ni ne dubu pri tio, tŝar Johano [9,21], kiu rakontas pri la elsendo de spionoj, ankaw mentsias la miraklan sanigon de denaska blindulo, du tagojn post la granda Festo de la Tabernakloj, nome en la trideka tago, aldonante: “Liaj gepatroj respondis kaj diris: «Ni stias, ke tiu-tŝi estas nia filjo kaj ke li naskidžis blinda. Sed kiel li nun tamen vidas, ni ne stias; kaj kiu malfermis liajn okulojn ni ankaw ne stias. Demandu al li mem, li havas plenadžon; li parolu por si mem.» Tion diris la gepatroj, tŝar ili timis la Judojn {estrojn}. Tŝar la Judoj jam interkonsentis ke, se iu deklarus ke li estas sekfanto de la Mesio, tiu estu forigita el la Synagogo.”

Dekreto pri ekskomuniigo sekfe jam estis lantŝita inter la 20^a aw 30^a tago. Tiu dekreto malkaŝas du okazintažojn, nome :: (1) Ke kunsido de la Asembleo jam okazis, tŝar nur tiu posedis la aŭtoritaton proklami tian gravan elpelon. (2) Ke dum tiu kunsido oni diskutis pri mortigo de Jesuo.

La antikfa Synagogo fakte konis tri gradojn de ekskomuniigo aw anatejmo: eksilo aw <niddoi>, abomeno aw <xojrem>, eksekuto aw <ŝammata>.

La unua grado, “**eksilo**”, kondamnis la frapiton vivadi izolite de la komunumo dum tridek tagoj. Li tamen ancoraw rajtis viziti la Templon, sed en loko aparta. Tiu unuagrada kondamnopovo ne estis rezervita al la Judžistaro {de Jeruzalemo} sola, sed povis proklamati en iu ajn urbo, kie pastroj siedžadis kiel judžistoj.

La dua grado, “**abomeno**”, male komplete trantŝis la kondamniton dis-de la juda sotsio. Tiu estis definitive forigita el la Templo kaj damnita. Nur la Sanhedrino de la tŝefurbo kapablis dekreti tiun formon de verdikto. Dži efektive tiun pronontsis dum la unua sekreta kunsido kontraŭ tiu kiu kuradžus aserti ke Jesuo estas la Mesio.

La tria grado, “**eksekuto**”, evidente estis la plej timiga el la tri. Estas džuste kontraŭ falsaj profetoj ke oni tiun pronontsis. La anatejmo tselis unuavitse mortigon de la animo {kaj sekfe perdo de la eterna vivo}, sed ofte ankaw mortigon de la korpo. La tuta asembleo džin pronontsis solene kaj akompane de plej teruraj malbenoj. Se la damnito, pro iu mildiga motivo ne liveratis al eksekuto, kiu konsistis en ŝtonizado, oni tamen metos post lia morto ŝtonon sur lia tombo, por indiki ke li estus meritinta morton per ŝtonžetado. Neniu rajtis akompani la korpon de tia mortinto nek etŝ funebri pro li.

Tŝio tiel supozigas ke la Sanhedrino, proklaminte abomenon kontraŭ apogantojn de Jesuo, priparolis en la sama privata kunsido lantŝi la mortpunon, ŝammata, kontraŭ ilia Majstro mem ! Antikfa talmuda traditsio tion almenaw asertas [Talmudo de Jeruzalemo “Pri la Sanhedrino”]. Dži etŝ aldonas ke Jesuo ekskomuniigatis per bruo de kfartsent trumpetoj (tiel!) kiel

estante sortŝisto kaj *deluranto de la popolo. Nu, se ni ne bezonas kredi tiun spektaklan enbildigon, estas tute ratsie kredi ke la mortpuno ek-de tiu momento estis proponata kaj diskutata. Estis nur pro timo je-de la popolo — kiu estis tute entuziasma pro la predikoj de la profeto kaj liaj mirakloj — ke tiu punverdikto ankoraŭ ne dektretatis ofitsale kaj publike.

Ja, tŝiel ajn, tiel kondamnante liajn aprobantojn publike, la Sanhedrino subkomprene denuntsis lin mem kiel falsan profeton, indan je la pinta verdikto. Kaj tamen, tiu “falsa profeto” ankoraŭ ne estis alkondukita al la Tribunalo, kaj ankoraŭ ne estis eksamenita pri siaj doktrino kaj mirigaĵoj ! Tŝu tio ne pravas, law la lojala rimarko de Nikodem, ke oni jam estis lin kondamninta “sen lin pridemandi kaj sen senpera ekstio pri tio kion li faris.”

4.2 La dua kunveno privata

La dua kaŝa siedĵado de la Sanhedrini okazis en la monato *Adar* (Februaro) de la romena jaro 782, iom pli ol kfar monatojn post la unua. Estis okaze de la revivigo de Lazar, la granda amiko de Jesuo, kiu estis mortinta kaj jam entombigita de kfar tagoj [Johano 11]. Kfankam ties kadavro evidente jam fiodoris en tiu varma klimato, Jesuo ordonis ke la mortinto relevidĵu kaj eliru sian tombon. Efektive tiel okazis: “Tiam multaj el la Farisajoj, kiuj venis al la {funebranta} familio kaj vidis, kion li verkis, kredis je li. Sed kelkaj el ili kuris al la estroj kaj rakontis al ili kion Jesuo faris. Tial la tŝefpastroj kaj tseteraj tŝambranoj kunvenigis la synhedron kaj diris: «Kion ni faru ? Tiu viro faras multajn mirigaĵojn. Se ni lasos lin agadi senhalte, tŝiuj anoj de la popolo kredos al li; la Romenoj venos kaj detruos nian landon kaj nian natsion !» Unu el ili, Kajafa, tŝefpastro en tiu jaro, diris al ili: «Vu stias nenion, nek konsideras ke estos pli bone por vu, ke unu homo mortu anstataŭ la tuta popolo, kaj nia tuta natsio ne pereu.» Li tamen ne diris tion tute el si mem. Estante tŝefpastro en tiu jaro, li ja profetis ke Jesuo mortos por la juda gento, kaj ne nur por tiu, sed por kunvenigi en unu popolegod la tŝie disŝetitajn filjojn de Dio. De-post tiu kunsido ili do interkonsentis lin kondamni al morto. Tial Jesuo plu ne aperis publike inter la estraranoj, sed foriris al la kamparo apud la dezerto al urbo nomizata Efraim, kaj tie li restadis kun siaj ditŝiploj. Tŝar la granda Paskofesto alproksimidĵis {en kiu tŝiu juda viro strebis iri al la tŝefurbo kaj ties Templo} multaj supred iris al Jeruzalemo el la kamparo por sin santigi. Ili do sertŝis ankaw la novan profeton kaj parolis inter si, dirante: «Kion tu pensas ? Tŝu ankaw Li venos al la festo ?» Sed la tŝefpastroj kaj la Farisajoj jam avane ordonis, ke se iu stias, kie estas Jesuo, tiu komuniki tion, por ke oni povu lin aresti.”

Tiele do, en tiu dua privata kunsido, la morto de Jesuo estis jam detsidita. Dum la unua sesio, tiu de Septembro, la ideo pri eksekuto estis ja tuŝita, sed oni ne kuradzis firmigi dĝin per publika kaj ofitsala protokolo. Tiam-tŝi, male, la detsido estis farita. La tŝefpastro, li persone kaj per la propra aŭtoritato, pronontsis la teruran verdikton: “Estas pli bone ke unu homo mortu anstataŭ la tuta popolo !”

{En la pensaro de Kajafa, la ideo pri popolribelo kontraŭ la ne venkeblaj romenaj legioj, kun posta vendza neniigo de la juda natsio, tserne ne estis pura inventaĝo ! Aliaj popoloj kaj gentoj jam estis tion provintaj, sed kun fiaska rezulto. Aliflanke, la nova profeto sendube estus povinta unuigi la Israelidojn en tia tutnatsia atako ... se tio estintus lia intentso. Bedawrinde, nek Kajafa nek liaj kompanoj volis aŭ povis kredi je Mesio kun nur pure religia kaj pure spirita misio por la tuta homaro, spite tute klarajn profetaĝojn en la Tenaxo.}

La verdikton pri morto li tial pronontsis tute eksterjure, sen etŝ mentsii la kulpulon, sen tiun pridemandi, sen ofitsalaj akuzantoj, sen atestantoj, sen fari iun ajn organizitan esploron de liaj instruoj aŭ de liaj mirigaĝoj ! Li dĝin pronontsis sen jura kulpigo pro ribelo aŭ falsa doktrino, sed sole kaj nure por haltigi liajn miraklofarojn, kiuj instigis la popolon senrezerve obei al li. Kaj la tuta judĝistaro sklave aprobis la verdikton.

Ja, kiom stiate, neniu persono protestis: “Ek-de tiu tago ili detsidis mortigi Lin.” La intentso pri eksekuto de Jesuo estis definitiva afero, pri kiu oni plu ne vere diskutos. Estis detsido solida kaj ne malfarebla, plenumebila senprokraste; restis nur determini la momenton kaj la rimedojn. Por tiu tselo, ili lantis arest-proklamon [Johano 11,57]: “La pastroj kaj Farisajoj ordonis ke, se iu stius kie Jesuo sin trovas, tiu indiku la lokon, por ke oni lin arestu.” Tŝu ankoraŭ netsesas pli evidenta pruvo ke, kiam Jesuo estos trovita, arestita, kaj aperigita antaŭ la Sanhedrino, ke li jam avane estos kondamnita al morto ?

4.3 La tria kaj ofitsala kunveno

Okazis tiu dudek aŭ dudek kŝina tagoj post la sekreta dua, Merkredon en la lasta semajno de la vivo de Jesuo, tio estis 12 Nisan de la jaro 782. “Interdume alproksimidzis la festo de la senfermentaj panoj {matsoj}, kiun oni nomizas Pasko {Pesax}. Kaj la tŝefpastroj kaj klarigistoj sertŝis rimedon por Lin mortigi, tŝar ili timis {la reagon de} la popolo.” [Luko 22,1].

“Tiam la tŝefpastroj kaj la pliadzuloj de la popolo kunvenis en la palatso de la {gvidanta} tŝefpastro, kiu nomizis Kajafa. Ili komplotis por eltrovi

kiamaniere kapti Jesuon per ruzo kaj mortigi Lin. Sed ili diris inter si: «Ne dum la festo, tŝar povus estidži tumulto en la popolamaso.» [Mateo 26,3].

Kiel la leganto povas konstati, tiu tria kunsido plu ne havis la tselon debati pri la sorto de la profeto. Ties destino estis jam detsidita, interkonsentita, establita en la dua sesio. Nun la demando estis determini la tempon kaj la manieron plej oportunajn por kapti kaj eksekutigi Jesuon. Ilia findetsido estis patsientsi kaj prokrasti areston dŝis post la Paskofesto, por ne intsiti la amason al kontraŭstara tumulto.

La membroj de la Alta Konsilio do estis disirontaj kun tiu detsido, kiam subite prezentis sin evento ne avanvidebla: “Tiam Judas Iskariot, unu el la dek du {apostoloj} venis al la tŝefpastroj, por liveri Lin al ili. Li konspiris kun la tŝefpastroj kaj la juristoj kiamaniere li liveru Lin al ili. Ili dŝojis awdante lin kaj promesis doni monon al li.” [Marko 14,10].


En Psalmo 69 la profeto {David} — al kiu la pasiono de la Mesio jam estis rivelita kun dŝiaj tsirkonstantsoj — vidis en spirito tiun trian kunsidon de la synhedraj viroj. Li vidis ilin embarasitaj, unue ne stiante sur kiu piedo stari por fiksi daton oportunan por mortigi la Mesion, sed tiam kun Judas en ilia mezo: “Miaj malamikoj fiĝarolis kontraŭ mi: «Kiam do li mortos kaj kiam lia nomo estos forviŝita? Tiuj kiuj min malamis flustris inter si opone al mi; ili konspiris por fari malbonon al mi. Fatala parolo estas dekretita kontraŭ Li, Li estas faligita kaj plu ne sin levos. Etŝ la viro de mia patso, tiu al kiu Mi konfidis, tiu kiu mandŝis mian panon, efike levis sian kalkanon kontraŭ Mi.»” [Law la hebrea originalo.]

Tiu maldigna perfido estis la solvo por la maltserteto de la Sanhedrino. Estos plu ne post la Paskofesto, en iu maltserta tago, sed je la tutunua favora momento por aresti Jesuon: “Ili promesis al li tridek ardŝentajn monerojn. Li konsentis kaj sin devontigis liveri Jesuon al iliaj manoj je la unua tawga okazo, sen intsiti la popolamason.” [Luko 22,6].

Tiun tawgan okazon, la judŝistaro ancoraw ne konis, sed dŝi tserte baldawis pro la insida kunlaboro de Judas. Jen tiel la turmento de la Mesio jam estis fiksita je la unua favora tsirkonstantso, kfankam Tiu ancoraw ne estis protsese judŝita. Pro la neatendita interveno de unu el la intimaj ditŝiploj, la dramo okazos do dum la solenaŝoj mem de Pasko kiam Jesuo krutsifatos. Kiel profeta simbolejo, la Ŝafido de Dio oferatos en tiu sama tago, kiam la paskaj ŝafidoj tra dek kfin jartsentoj kutimis esti butŝataj ! {Fakte, estis ne nur en la sama tago, sed etŝ en la sama minuto kiam la butŝado komentsidŝis, law ACE !}

Vitsigu ni nun la interkonsentojn de la tri priskribitaj konsilioj:: En la unua kunsido, rekte anatejmante la partianojn de Jesuo, oni nerekte akuzis Lin esti falsa profeto, kio meritis la morton. - En la dua kunsido, la demando pri eksekuto estis klare formuligita kaj aprobita. - En la tria kunsido, aresto kaj mortigo planatis je la unua favora okazo.

Sekfe, ni demandas al tŝiu Israelido *objektetsa kaj sintsera:: Kiam la Sanhedrino alkondukigos Jesuon el Nazaret, por esti prijudžata kiel akuzito, tŝu tiu protokolo estis io alia ol hypokrita teatražo, sanga mensogo. Tŝu la akuzito, kiom ajn senkulpa li povis esti, ne estis tsertege tserte jam kondamnita al morto ? Jen la vera karaktero de la pretendata senpartietso kaj objektetso de la Granda Tribunalo, la 71-opo, kies ofitsala devo estis apliki kaj konservi la mosean ledžaron.



5. Juraj protsedoj devigaj law Moseo

Konante la moralan nivelon de pliparto el la synhedraj membroj kaj iliaj kaŝaj planoj kontraŭ Jesuo, ni povus jam enpenetri la tribunalan salonegon kaj asisti al la historika protseso, kune kun la publiko tie amasidzinta. Tamen utilas iom prokrasti, por akiri kelkajn bazajn notsiojn pri la krimjuro tŝe la Hebreoj, kiuj ekkonoj helpas iom pli bone kompreni la *lezifojn (perfortojn) faritaj al la Ledžaro en tiu mond-tŝarnira dramo. Krom la naturaj sotsiaj ledžoj, dženerale komunaj al tŝiuj epokoj kaj regionoj, la hebrea popolo — estante elstare tsivilizita — posedis detale ellaboritan jurkodekson originanta el la buŝo de JHWH aw el la sadžo de džiaj gvidantoj. Tŝi-poste do kion leganto stiu pri tiu ledžaro.

Bedawrinde, la juda ledžodonado, law printsipoj kaj *dolmetŝado, estis transdonata de *geneardžo al geneardžo nur buŝe kaj ne skribe, konsistigante tiel Traditsion. La Pentatuxo kaj aliaj libroj de la Malnova Aliantso sekfe liveras nur malmultajn donitažojn pri la jura sistemo de la Hebreoj. Estas tial pretsipe la Traditsio, kiun oni devas konsulti aldone al la Biblio, por bonkompreni la protsedojn de la Sanhedrino rilate al krimaj faroj. {En teokratijo tio evidente ofte kontsernas pekojn kontraŭ la tie adorata di(ar)o, plivole ol kontraŭ la sotsio.}

Tiuj traditsioj registratis, post dek sep jartsentoj, en fama verkažo de la rabeno Juda, nomizata *Miŝna* aw “Dua Ledžaro”. Post kiam Imperiestro Hadrianus fortŝasis la Judojn el ilia hejmgrundo, ili vivadis en tiel mizera stato, ke la kortuŝita rabeno detsidis skribe kaj komplete fiksi ilian Traditsion. La diasporaj Judoj konsideras tiun kodekson kiel “Parola Ledžaro”, kontraste al la “Skriba Ledžaro” de la Pentatuxo, rekte donita de JHWH al Moseo.

Pleje interesas nin en dži la traktažo “Pri la Sanhedrino”, kiu džuste detaligas la devigajn protsedojn en la fifama protseso. Ni vaste tŝerpos el dži, sen pro tio neglekti kromajn jurajn regulojn dise troveblajn en la aliaj traktažoj de tiu kolektego. Kompreneble, ni devas fojfoje apliki terminojn aw notsiojn prunteprenitaj el nejudaj jurkodeksoj — tŝi-kaze la frantslanda juro, por ke ankaw aligentaj homoj komprenu.

La Miŝnao entenas sesdek tri traktažojn, grupigitaj en ses tŝapitroj aw “ordoj”: Pri la semažoj, Pri la festoj, Pri la virinoj, Pri la damadžoj, Pri la sant-

aĵoj, Pri la sinpurigado. La kfara traktaĵo de la tŝapitro pri damadĵoj temas pri la Sanhedrino.

Evidentas ke ne tŝiuj traditsioj registritaj en la Miŝnao estas senesepte kaj nepre awtentaj ! Pluraj ne povas ne esti (iom) modifitaj, troigitaj, inventitaj de la avanaj rabenoj por ankoraw pli reliefigi la justetson de la Sanhedrino {kaj sekfe de ties membroj; ni jam mentsiis tiaĵojn en la unua tŝapitro.} Sed tio felitŝe ne malhelpas ke la pliparto estas tute fidinda kaj datas de la antikfa synagogo. Por distingi verajn dis-de malverajn en la kazo de Jesuo, egzistas efika regulo: tŝiufoje ke oni renkontas en la Miŝnao ledĵon perfortitan en la granda protseso, oni povas esti tserta ke dĵi devenas de la antikfa Asembleo kaj ne estas ŝandĵita fare de la Konsilianoj. Tŝi-lastaj ja tŝiel ajn klopodis modifi en la hebrea ledĵaro tŝion, kio povus vekti suspekton pri la konduto de la Sanhedrino, rilate al Jesuo, en la mensoj de la posteularo. {La vasta plimulto de aktualaj Judoj kunsekfe havas tute eraran ideon pri la fia protseso !}

Se tamen renkonteblas, en la malnovaj dokumentoj, tiu aw alia ledĵo aperte vundita (*lezifita), estas tŝar la kontsernatoj ne trovis rimedon por tion eviti. La tempo kaj tutmonda pritraktado tra kristanaj kanaloj ilin portŝiame fiksis.

5.1 Tagoj kaj horoj malpermesitaj

5.1.1 Malpermeso siedĵi dum la Ŝabato aw alia festotago

“Oni ne judĵu en la tago de Ŝabato aw en festotago” [Miŝnao “Pri la ovo” 5,2]. La solenetso de tiaj {religiaj} tagoj sufitŝe pravigas tiun malpermeson. Maimonides {la granda juda teologo}, en sia komentario pri la Sanhedrino (tŝapitro 2) aldonas: “Tŝar estis *proiskriptite eksekuti la krimulon tuje post la {definitiva} verdikto, la kontserna torturo, egzemple tiu de la fajro, estintus *lezifo kontraŭ la Ŝabato, law tio kio estas skribita en Eksodo 35,3: «Tu ne bruligos fajron en iu ajn el viaj domoj dum la ŝabata tago.»”

5.1.2 Malpermeso siedĵi etŝ en la avana vespero de Ŝabato aw festotago

“Ili ne judĵos, nek en la avanvespero de Ŝabato, nek en la avanvespero de festotago” Per tiu ordono oni volis ne devigi la judĵistojn postmatene lezifi la ledĵon de la Ŝabato, se iu kazo ne estis findiskutita avanvespere. [Miŝnao “Pri la Sanhedrino” 4,1 – Talmudo de Jeruzalemo “Pri la Geedzidĵa Kontrakto” 24 kaj “Pri la malgranda festo” 63].

5.1.3 *Malpermeso dawrigi primortan protseson*

Maimonides komentas tiun ordonon jene en sia “Pri la Sanhedrino” 3: “Oni detenis sin eksameni primortan kazon dumnokte, tŝar ni stias pro la parola traditsio, ke tio similas al granda vundo; oni povas dŝin bone trakti nur dumtage.” [Miŝnao “Pri la Sanhedrino” 4,1].

5.1.4 *Malpermeso siedŝi avan plenumo de la matena ofertseremonio*

“Tŝar la matena sant-ofero solenatis tŝe la sunlevidŝo mem, estis do nur unu horon poste, ke la Sanhedrino rajtis siedŝi” [Talmudo de Jeruzalemo “Pri la Sanhedrino” 1,19 – Talmudo de Babilono 10,88 – Miŝnao “Pri la tŝiama sant-ofero” 3].

5.2 Pridemandado de la atestantoj

5.2.1 *Da akuzantoj devis esti almenaw du*

“Unu sola atestanto ne sufitŝos kontraw iu, senrigarde la lezifon aw krimon pri kiu oni kulpigas tiun. Sed tŝio detsidatos surbaze de la asertoj de du aw tri atestantoj.” [Dewteronomo 17,6 – Nombroj 35,30].

5.2.2 *La akuzantoj devis atesti unu sendepende de la alia(j) kaj en tŝeesto de la akuzato*

“Daniel diris al la popolo (rilate al la du maljunuloj kiuj kulpigis non Suzana): «Disigu l’unun de la alia, kaj mi pridemandos ilin.»” [Daniel 13,51].

5.2.3 *Avan fari sian deklaron, tŝiu akuzanto devis solene ŝuri diri la veron law sia kontsientso*

La judŝisto ŝurigis ilin per la sekfa formulo: “Ne estas konjektojn aw oni-dirojn al tu instruitajn, kiujn ni demandas de tu. Pensu ke grava respond- etso kuŝas sur tu; ke la kazo kiu okupas nin ne temas pri mono tŝe kiu oni povas kompensi la damadŝojn. Se tu igus kondamni la akuzaton maljuste, lia sango kaj etŝ la sango de lia tuta posteularo, kiun tu farrabus de Tero, falus sur tud. JHWH postulus kontentigon de tu, same kiel Gi postulis de Kain kontentigon pro la sango de Abel.” [Miŝnao “Pri la Sanhedrino” 4,5].

5.2.4 *La judĝistoj devis tre atente pesi la akuzojn*

“Kiam tu, post tre profunda eksameno, ekkonos ...” [Dewteronomo 19,18] – “La atestantoj devas esti esplorataj rilate al sep spetsoj de demandoj: Tŝu estis dum jubilea jaro ? Tŝu estis dum ordinara jaro ? En kiu monato ? En kiu tago de la monato ? Je kioma horo ? En kiu loko ? Tŝu estis tiu-tŝi persono ?” [Miŝnao “Pri la Sanhedrino” 5,1]

5.2.5 *La akuzoj estis sen valoro se ne tŝiuj kongruis dĝisdetale pri la sama fakto*

“Se unu atestanto kontraŭdiras alian, la atesto ne estas aktseptebla.” [Miŝnao “Pri la Sanhedrino” 5,2] - “Tiel, kontserne apostatsetson de la kulto je Jehovo, se unu atestanto asertas esti vidinta Israelidon adori Sunon, dum alia esti vidinta tiun adori Lunon – kfankam ambaw deklaroj same pravas idol-adoradon kaj ke tio estas terura peko — la pruvo estos nekompleta kaj la akuzato tial senkulpigita.” [Maimonides “Pri la Sanhedrino” 20 ks.].

5.2.6 *False akuzantoj devis esti kondamnataj al la sama puno, kiun estus ritsevinta la akuzato*

“Kiam, post tre pretsiza esploro, la judĝistoj konstatos ke akuzanto nur kalumniis sian {hom}fraton, ili traktos lin same kiel li intentsis trakti sian fraton ... Tu ne havos kompaton por la kulpulo, sed tu pagigos vivon por vivo, okulon por okulo, denton por dento, manon por mano, piedon por piedo.” [Dewteronomo 19,16-21] - “La Judoj {la estroj} sin levis kontraŭ la du maljunulojn, tŝar Daniel ilin konvinkis ke tiuj per propra buŝo faris falsan akuzon; kaj ili suferigis tiujn per la sama puno kiun tiuj volis kawzi al Suzana, por plenumi la ordonon de Moseo. Tiel ili mortigis tiujn.” [Daniel 13,61].

5.3 Pridemandado de la akuzato

5.3.1 *La eldiroj uzotaj kontraŭ la akuzato devis esprimi humanetson kaj bonvolemon.*

“Joŝuwa diris al Axan: «Mia filjo, donu gloron al la Sinjoro Dio de Israel; konfesu tuan kulpon kaj deklaru al mi kion tu faris, sen ion kaŝi.» [Joŝuwa 7,9] - “Mia tre kara filjino, suspektata pri adoltado, tŝu la kawzo de tiu peko ne estis trokonsumado de vino ? Tŝu ne povus esti la malseriozetso aw la kontakto kun malbonaj najbaroj, kiu kondukis al tio ? Plenumu do, je la

timinda nomo de la Dio de Israel, la santajn tseremoniojn indikitaj en tiu-tŝi tsirkonstantso.” [Miŝnao “Pri la virino suspektata pri adoltado” 1,4].

5.3.2 *Etŝ nura sinkulpiga deklaro de la akuzato mem ne sufitsis por tiun kondamni.*

“Estas baza printsipo por ni, ke neniu povas fari malprofiton al si mem. Se iu akuzas sin antaw la judĵistaro, oni ne kredu tiun se la kazo ne estas apog-ata de {almenaw} du atestantoj. Estas bone rimarkigi ke la eksekuto je-de Axan, en la tempo de Joŝuwa, estis esepta evento kawzita de la naturaj tsirkonstantsoj, tŝar nia ledĵaro neniam kondamnas law simpla sinkulpigo de la akuzato.” [Miŝnao “Pri la Sanhedrino” 6,2 – “Pri la geedzidĵaj leteroj” 3,9 – Maimonides “Pri la Sanhedrino”].

5.4 Defenda pledado

5.4.1 *La akuzato rajtis defendi sin mem, kaj la siedĵantoj rajtis paroladi favore al la akuzato, kio konsideratis ago de pietso.*

“Kiam mi ekokupis mian lokon tŝe la urba pordego {tŝar en tiu fora epoko oni kutimis apliki juron tie} mi zorge enketis pri la krimkazo, kiun mi ne konis. Mi rompis la makselojn de la maljustetso kaj forŝiris la predon el-inter dĵiaj dentoj.” [Hijob 29,7,16] – “Asistu la prematon, faru justetson al la orfo, defendu la vidvinon.” [Jesaja 1,17] – “Daniel kriis per lawta votŝo: «Mi estas senkulpa pri la sango de tiu-tŝi virino.» La tuta popolo turnis sin al li, demandante: «Kion signifas la parolo ke tu ĵus eldiris ?» Rekte starante inter ili, li respondis: «Tŝu vu estas tiel malsadĵaj, Idoj de Israel, kondamni filjinon de Israel sen eksameno pri la vero ?»” [Daniel 13,46].

5.5 La judĵado mem

5.5.1 *Kiam protseso kondukis al kondamno je mortigo, tiu kondamno ne rajtis plenumati en la tago mem de la kondamno, sed la judĵistoj devis prokrasti dĵis la posta tago la votŝ-donadon kaj proklamon de la verdikto.*

“Tŝiu krimjudĵo povas finpreni en la sama tago kiam dĵi komentisis, se la rezulto de la debatoj estas senkulpigo de la akuzito. Sed se oni devas pronontsi kondamnon al morto, dĵi finprenu nur en la posta tago.” [Miŝnao “Pri la Sanhedrino 4,1].

5.5.2 *En la interduma nokto, la judĝistoj devis po du en siaj domoj rekomentsi eksamenadon de la krimo, sintsere kaj kontsientse pesadi la pruvojn alportitajn kontraŭ la akuzato kaj la eblajn tsirkon-startsojn favorajn.*

“Prokrastinte la verdikton dĝis la posta tago, la judĝistoj kunvenas po du kaj ili rekomentsas inter si esplori la kazon.” [Miŝnao “Pri la Sanhedrino” 5,5].

5.5.3 *Por ke tiuj privataj diskutoj okazu sobramense, la judĝistoj devis en tiu nokto deteni sin de tro abunda mandĝado, de vino, de likworoj, de tŝio kio povus misinflui al sana rezonado.*

“Malpliigante siajn nutraĝojn kaj fortenante sin de vino, ili eksamenis la kazon.” [Miŝnao “Pri la Sanhedrino” 5,5] – Oni prenis apogon ankaw sur jena versaĝo el Leviidoj: “Tu ne mandĝos super la sango {de homo}.” [19,26].

5.5.4 *Ree kunvenintaj posttage en la tribunalo, la judĝistoj devis tŝiu laŭvitse esprimi sian opinion, tŝu kondamnan aw senkulpigan.*

“En la posta tago ili reiras al la tribunalo. Tiam, tiu kiu senkulpigas devas diri: «Mi senkulpigas» kaj tiu kiu kondamnas devas diri: «Mi kondamnas». [Miŝnao “Pri la Sanhedrino” 5,5].

5.5.5 *Du aktaristoj devis registri la votojn, la unu tiujn favorajn, la alia tiujn malfavorajn.*

“La Sanhedrino estis arandĝita en duonrondo. Tŝe tŝiu ekstremaĝo de tiu duonrondo lokis sekretario ŝardĝita kolekti la votojn. Unu el ili tiujn senkulpigajn, la alia tiujn kondamnajn. [Miŝnao “Pri la Sanhedrino” 4,3].

5.5.6 *La nombro da malfavoraj votoj devis superi la nombron da favoraj per almenaw du.*

“En {mortmeritaj} krimjudĝoj sufitŝis unu votŝo por liberigi la akuzaton, sed por lin kondamni netsesis plimulto de {almenaw} du.” [Miŝnao “Pri la Sanhedrino” 4,1] – “Tŝar la Sanhedrino konsistas el sepdek unu membroj, se 35 kondamnas, la akuzato estas apsolvita kaj oni senprokraste liberigu lin. Kaj etŝ se 36 kondamnas, li ancoraw estos libera.” [Miŝnao “Pri la Sanhedrino” 5,5].

5.5.7 *Verdikto pri mortigo, pronontsita ekster la salonego de tŝizitaj ŝtonoj, estis senpere malvalida.*

“Kiam oni forlasas la salonegon de tŝizitaj ŝtonoj, oni rajtas pronontsi mort-verdikton kontraŭ neniu ajn.” [Talmudo de Babilono “Pri idoladorado” 1,8] – “Povis okazi kondamnon al morto nur kondiĉe ke la Sanhedrino siedzis en sia {destinita} loko.” [Maimonides “Pri la Sanhedrino” 14].

6. Lezifoj dum la nokta kunsido

6.1 Temposituigo.

Du kunsidoj publikaj deditŝatis al la fia protseso. La unua okazis dum la nokto de 14 Nisan (Marto), kion raportis la evangeliistoj Johano, Mateo, kaj Marko. La dua okazis matene de la sama tago, kion resume raportis Mateo kaj Marko, kaj pli detale Luko.

La Synhedro do kunvenis la trian fojon publike kaj plu ne kaŝeme, tŝar la judŝo pri Jesuo devis esti ofitsala. Temis vere pri la granda asembleo, konsistanta el la tri “tŝambroj” de la natsio: pastroj, klarigistoj, pliadzuloj ! Netsesas tion klare substreki, por ne lasi dubon pri la ofitsaletso {kiu enprenis la tutan popolon}: “La soldatoj do, tenante Jesuon, kondukis Lin al la domo de la printso de satserdotoj, Kajafa, kie tŝiuj pastroj, klarigistoj, kaj pliadzuloj estis kuven-intaj.” [Mateo 26,57 – Marko 14,53].

“Estis nokto,” atestas Johano [13,30] kaj “La kohorto kaj la trabantoj de la tŝefpastroj lin alkondukis, armizitaj per glavoj kaj bastonoj, lanternoj kaj tortŝoj.” Jen **la unua lezifo**, tŝar la juda ledŝokodekso malpermesis protsedi dumnokte [ŝ5.1.4]: “Oni traktu gravan kazon dumtage, sed faligu dŝin dumnokte.” [Miŝnao “Pri la Sanhedrino” 4,1].

Estis ankaw post la vespera ofer-tseremonio. Jen **la dua lezifo**, tŝar: “Ili kunsidu nur inter la matena ofer-tseremonio kaj la vespera ofer-tseremonio.” [Talmudo de Jeruzalemo “Pri la Sanhedrino” 1,19].

Estis krome en la unua Tago de la Nefermentitaj Panoj, avantage de Pasko. Jen **la tria lezifo** tŝar: “Ili ne judŝos nek avantage de Ŝabato, nek avantage de festotago.” [Miŝnao “Pri la Sanhedrino” 4,1].

6.2 Unua pridemandado fare de Kajafa.

“La tŝefpastro nun demandis Jesuon pri lia instruado.” [Johano 18,19] – Estis Kajafa kiu pridemandis, tiu sama Kajafa kiu post la revivigo de Lazar kriis, ke la komuna intereso postulas eksekuton de Jesuo el Nazaret. Do, tiu kiu

ekrolis kiel akuzanto nun volas roli kiel senpartia judĵisto, ja etŝ kiel dĝenerala prezidisto de la debatoj ! Kulmino de malhonestetso kaj **kfara lezifo**; malregulaĝo indigniga. Tŝiuj demokratijaj juroj, pretsipe tiu de la hebrea ledĝaro, malpermesas al akuzanto siedĝi kiel judĵisto. “Se ... iu atestanto ekakuzas iun alian pri lezifo de la ledĝo, en tiu konflikto inter si ili devos prezenti sin antaw la Sinjoro en tŝeesto de la judĵistoj kiuj ofitsos en tiu tempo.” [Dewteronomo 19,16].

Klaras, ke akuzanto kaj judĵanto ne rajtas esti unu sama persono. Tie-tŝi ili mergidĝas: Kajafa, kiu hieraw akuzis, hodiaw siedĝas ! Estas jura monstraĝo, kiun Johano spetsife elstarigas en sia raporto pri la Pasiono: “Kajafa estis tiu kiu konsilis al la magistratoj ke estos utile ke unu homo mortu anstataw la tuta popolo.” [18,14] Kaj plue: “Li pridemandis Jesuon pri liaj ditŝiploj kaj pri lia doktrino.” [18,19].

Kajafa, samtempe akuzanto kaj eksamenanto, komentsas per ruza pridemandado por kapti Jesuon en ties propraj konfesoj, anstataw alirigi atestantojn kaj tsiti la akuzojn, kiel postulas la juda kredo: “Se sin trovas inter vu viro aw virino, kiu faris malbonon antaw la Sinjoro, tu esploros tre pretsize tŝu tio kio asertatas estas vera ... kaj law la deklaro de du aw tri atestantoj.” [Dewteronomo 17,2-6].

Jen **kfina lezifo** pro la malpermesita protsedoformo. Kio estas pli malhonesta ol arestigi homon al kiu oni povas imputi neniun krimon ? Kio estas pli mallojala por judĵisto ol mem fari pridemandadon sen unue prezenti la akuzon ?

“Jesuo respondis: Mi malkaŝe parolis al la mondo. Mi tŝiam instruis {publike} en la synagogoj kaj en la {granda Templo}, kie la Judoj kunvenas. Nenion mi diris sekrete. Pro kio tu do pridemandas Min ? Plivole pridemandu tiujn kiuj awdis kion mi parolis. Jen tiuj kiu stias kion mi instruas.” [Johano 18,20].

La respondo de Jesuo dĝuste elstarigas la kontrawledĝetson fare de Kajafa, komentsi la pridemandadon sen avana enformuligo de la delikto. Avan fari pridemandadojn, la judĵistoj havis la devon nete resumi la akuzon kiun ili devos eksameni. “Kial tu pridemandas min ?” tiel signifas: “Tŝu tu volas ke mi estu mia propra denuntsanto ? Tŝu tu havas ion pretsizan kaj netan por riprotŝi min ? Se tiel statas, tu devas tion esplitsi kaj demandi tŝu mi konfesas. Sed, se tiel ne statas kaj tu nenion ekstiis, nek per tu mem nek per alies deklaroj, kio meritus mallawdon en miaj instruoj, kiel tu do deziras ke mi igu min mem kulpa kaj akuzanto ? Male, tŝu tu ne vidas, ke tu fakte senkulpigas min law la ledĝo, donas al mi garantion de senkulpetso, montrante ke tu posedas nenion alian ol propra konfeso ?” [ŝ5.3.2]

“Je tiuj paroloj, unu el la trabantoj kiuj postenis apud Jesuo, donis al Tiu vangofrapon, dirante «Tŝu tu tiel {arogante} respondas al la tŝefpastro ?»”

[Johano 18,22]. En tiu ega krudetso de servisto, en tŝeesto de la prezidisto, kuŝas **sesa lezifo** [§5.3.1]. Jes, estas maljustaĝo, ke iu subulo senpune povas mistrakti iun kiun li trenis antaŭ la tribunalod, sen aŭtoritato kaj en tŝeesto de magistrato. Tŝu ne tŝiuj demokratijaj ledĝokodeksoj ordonas, ke akuzato trovas sin sub protekto de ledĝoj kaj judĝistoj dĝis kiam li aŭ ŝi estas trovita kulpa ? Tie-tŝi, la manko je reago kaj aprobo per silento, konfirmas ke la Konsilio aktseptas la perforton kaj la kontraŭledĝaĝon. Jen en si mem evidenta pruvo pri la maljustetso de la judĝistoj, pretsipe de tiu kiu prezidis. Memoru ke Miŝnao kaj Biblio ordonas montri al akuzato bonvolemon kaj humanetson, des pli fortenti de li perfortaĝojn !

“Jesuo diris al li: Se Mi parolis maldetse, pruvu do ke estis maldetse; sed se mi detse parolis, kial tu frapas min ?” [Johano 18,2,3] La profunda enhavo de tiu rebato estas la sekfa. “Se mi malbone parolis kontraŭ la tŝefpastro aŭ kontraŭ la vero, montru la malbonon; pruvu per kio mi misfaris. Sed se mi nenion misdiris, nek kontraŭ la tŝefpastro, nek kontraŭ la vero; se mi nur uzis la normalan protsedadon kiel mi rajtas; se mi utiligis frazojn ne riprotŝeblajn laŭ enhavo kaj formo, pro kio tu frapas min.”

Jesuo estus povinta laŭrajte eldiri aferojn multe pli fortajn, ne nur al tiu sendigna servisto, sed al la prezidanta grandpastro mem, kiu toleris tian trakton. Sed — kiel iam komentis Santa Cyprianus — se li ne faris tion, estis tŝar li ne volis senhonorigi la satserdotetson en la persono kiu dĝin portis. Pro tio li tamen efike kaj digne defendis sian senkulpetsion.

6.3 Deklaroj de la akuzantoj

“La tŝefpastroj kaj la tuta Alta Konsilio nun sertŝadis akuzon kontraŭ Jesuo, kiu meritigus mortigon, sed ili nenion trovis. Ja aperis multaj por fari falsajn akuzojn kontraŭ li, sed tiuj akuzoj ne akordidĝis.” [Marko 14,55].

Post la sindefendaj respondoj de Jesuo, kiu postulis deklarojn de akuzantoj, idĝis normale maleble kondamni lin, se oni ne suktsesus produkti aktsepteblajn akuzojn. Kion do faras la Synhedranoj ? Ili irigas sertŝadi atestaĝojn inter siaj propraj apogantoj; ili ordonas etŝ ke oni tiujn subatŝetu por atesti kulpige ! Monstra maljustaĝo. Ne nur, ili preterlasas ekstreme esplori la akuzantojn kaj ties deklarojn, laŭ la ordono de Moseo [§5.2.4], sed per **oka lezifo** ili etŝ preterlasas ĝurigi tiujn akuzantojn diri nur la veron [§5.2.3]. Ankoraw pli, tiuj-tŝi senhontaj judĝistoj, koruptante la akuzantojn, mem falas sub la hakilo de la ledĝo pro la ordono de paragrafo 5.2.6 ! Tiun ledĝon ili perfortis en si mem kaj en tseteraj – **nawa lezifo** ! Vere, estis ili plu ne plenumantoj de la Ledĝaro, sed kaverno da murdemuloj soifaj pri la sango de sia viktimo.

Strange similas tiu degenerinta asembleo al tiu kunsido kiun ordonis la redžino Jezabel por kondamnigi la senkulpan Naboth [Redžoj 21,8-14]: “Ŝi mem skribis leteron falsan en la nomo de Redžo Axab, kiun leteron ŝi provizis per la redža sigelo. Kaj ŝi džen sendis al la Pliadžuloj, al la estroj de la urbo kie lodzis Naboth. La letero tekstis jene: «Sidigu non Naboth inter la gvidistoj de la popolo. Intsitu kontraw li du idojn de Belial, ke ili atestu ke li blasfemis kontraw JHWH kaj kontraw la redžo. Ke oni trenu lin ekster la urbod, ke oni lin ŝtonizu kaj lin mortigu.» La pliadžuloj kaj estroj de la urbo, kie lodzis Naboth, plenumis tion kio ordonis la letero ... Du idoj de Belial, prezentante sin antaw la Asembleo, deklaris ke Naboth blasfemis kontraw JHWH kaj kontraw la redžo. Oni kondukis lin ekster la urbod kie oni pereigis lin per ŝetado de ŝtonoj.”

Dawrigu ni per la atestoj kontraw Jesuo [Marko 14,56 – Mateo 26,60]: “Multaj atestis false kontraw Jesuo, sed iliaj deklaroj ne kongruis. Fine venis du falsuloj, kiuj ekstaris kaj akuzis jene: «Ni awdis lin diri: Mi kapablas detruji la templon de Jehovo, kaj post tri tagoj džen rekonstrui. Mi detruos tiun-tŝi templon konstruitan de homaj manoj kaj post tri tagoj mi rekonstru-os unun ne faritan de homaj manoj.» Sed tiu deklaroj ne {perfekte} unuformis.”

Tamen, avan eksameni la enformuligon de tiu duobla akuzo, atentigu ni pri **deka lezifo**. Ekstaris ja du akuzantoj kiuj ambaw samtempe faris deklaron, kio estas malobeo al la ledžo [§5.2.2].

Kaj nun la akuzoj mem, kiuj estis de ekstrema gravetso. Memoru kiom la juda popolo gloris pri sia Templo {kiel Tabernaklo kaj monumento}. Kiam la profeto Jeremija awgure anontsis ke “JHWH iun tagon *kataduktos la templon al la sama {ruina} stato kiel Siloh, kaj faros el dži dezerton,” la pastroj kaj popolanoj lin preskaw ŝtonizis. Li eskapis morton nur pro interveno de du potentsuloj kiuj anis al la redža kortego. La mentsiita akuzo en-vortigita kontraw Jesuo el Nazaret kunsekfe gravegis. Neniu miro ke dži kaptis la atenton de la Konsilio. Oni esperis finfine disponi sufitŝan motivon por jure kondamnigi la akuzaton.

Jes, efektive ... se la atestaĵoj estis veraj kaj kongruaj, du kfalitoj nepre postulataj de la juda ledžaro [§5.2.5]. Sed, kiel ni demonstros, ili estis falsaj kaj ne kongruaj.

Unue, la deklaroj estis malvalidaj tŝar ili tsitis la eldirojn de Jesuo en tute alia sentso ol originale. Tiu fakte aludis al la vivanta templo de sia santa korpo kaj neniel tselis la materian templon de Jeruzalemo. La evangeliisto Johano [2,21] tion emfazis: “Li intentsis paroli pri la templo de sia korpo.” Tiutsele Jesuo elektis vorton egalan al “malkonstrui”, kion la akuzantoj *dolmetŝis en la sentso de “detruji”, dum dži nature kaj aperte signifis “disrompi” – “Rompu la ligojn de tiu-tŝi templo !” Tiu diraĵo rilatis al vivanta

korpo, al templo vivanta kies kunligojn oni povas rompi per morto. Sed, kio definitive fiksas la signifon, estas la posta deklaro: “Kaj en tri tagoj Mi dĝin restarigos.” Tio ne netsese egalas al “Mi dĝin rekonstruos.” Se Jesuo estus aludinta al la materia templo de Jeruzalemo, li estus uzinta la vortojn “detrui” kaj “rekonstrui”. Sed, aludante la templon mistikan de sia korpo, li aplikis la vortojn “disrompi” kaj “restarigi”. La paraleletso de tiuj esprimoj, intentse elektitaj, sekfe sufitŝus por senkulpigi Jesuon pri tŝiu ajn mis-intentso kontserne la Templon de la tŝefurbo. Konklude, la du atestantoj āw miskomprenis siajn samreligianojn — kiuj krie ripostis: “Kiel do, oni bezonis kfardek ses jarojn por konstrui tiun-tŝi templon, kaj tu dĝin konstruos en nur tri tagoj ?” — āw ili komprenis dĝuste, sed kun perfida intentso raportis la eldirojn kun maldĝusta sentso. Tiukaze ili estis falsaj akuzantoj per du aspektoj. Ne nur ili altributis al Jesuo la deklaron “mi povas detrui, mi detruos” — kiujn Tiu ne utiligis — sed ili rilatigis ilin al la granda templo, kiu neniel tselatis.

Sed vidu, etŝ se la atestantoj akuzis law vero kaj Jesuo reale pronontsis tiujn parolojn, ilia atestado restis jure senvalora pro la paragrafo 5.2.5 kiu postulas apsolutan kongruon en tŝiuj detaloj. Atestante ke Jesuo diris: “Mi detruos tiun-tŝi templon faritan de homaj manoj,” la unua akuzanto kulpigis Jesuon pri atentsodeziro kontraw la religio kaj kontraw natsia fieraĝo. Dume, la dua akuzanto kulpigis Jesuon pri nura fanfaroniĝo kaj memglorigo. Sekfe ne regis kompleta kongruo inter la du akuzoj, kiel prave atentigas Marko 14,59: “Ankaw en tio-tŝi iliaj atestoj ne kongruis.” Tial, se oni ne forsendis Jesuon libera, oni kawzis kroman lezifon: **la dek unua lezifo**.

6.4 Dua pridemandado fare de Kajafa

Ege anstataw ŝovi flanked tiujn akuzojn, ledĝe ne konsiderindajn, Kajafa ilin aktseptas kaj uzas por fari novan pridemandadon: “Tiam la tŝefpastro, ekstarante meze de ili, demandis al Jesuo «Tu nenion respondas al tio kion tiuj-tŝi riprotŝas al tu ?»” [Marko 14,60] Tio egalas al: “Tŝu tu ne awdis la pezan akuzon kiun tiuj-tŝi levas kontraw tun ? Parolu do !” Kajafa evidente esperis ke Jesuo, tuŝita en sia honoro, donus eksplikon kiu makulizus lin ancoraw pli. “Sed Li mutis kaj nenion respondis.” [Marko 14,61].

Lia kawzo ja defendis sin mem; estis neniuj bezono por pledado, tŝar ne temis pri la templa konstruaĝo, sed pri la natura korpo de Jesuo. La ekspliko, kiun oni *espektis de Li, trovidĝis en liaj realaj frazoj kaj ne en tiuj torditaj de la akuzantoj. Jesuo plu ne respondis, por montri ke Li komprenas la kaŝ-intentson. Lia silento tiel estis forta riprotŝo.

En tiu horo de la protseso plenumidzis la orakolo de David en Psalmo 37,13: “Tiuuj kiuj sertsis pretekston por damadzi min, diris aferojn vanajn kaj malverajn, kaj ili tserbumis por irigi min en kaptilod. Sed mi estis rilate al ili surdulo, kiu ne awdas, kaj kiel mutulo kiu ne malfermas la buŝon.”

Estas strange, ke tiu trankfila kaj majestas silento ne malfermis la okulojn de liaj judzantoj. Ne estas normale por viro, gardi silenton en kazo kie temas pri lia vivo ! Pilatus kontrawe, kfankam estante kompleta pagano, kelke da horoj pli poste estos frapita de la solena silento de Jesuo antaw li. Li sentos maltrankfilon kaj respekton kaj faros klopodojn por savi la kulpigitan de torturo. Sed tiam-tŝi Kajafa, kaj la Sanhedrino kune kun li, neniel ekkonas per lia mutetso Tiun pri kiu la profeto anontsis: “Li estos muta kiel ŝafido antaw tiu kiu dzin tondas.” [Jesaja 53,7].

Male, Kajafa kaj lia kolegaro sentas kreski sian koleron. Ili plu ne volas esti prem-egataj de tiu silenta akuzo kiu ilin konfuzas, ilin regas. Eliro, netsesas eliro el tiu situatsio, por fini la aferon ! Kajafa dzin trovos !

6.5 Tria pridemandado fare de Kajafa

“La tŝefpastro demandis lin denove: «Mi ŝurpostulas de tu per Dio vivanta deklari al ni tŝu tu estas la Mesio, la Filjo de Jehovo benata !»” [Marko 14,61 – Mateo 26,63].

